# Trejnilo de Esperanta Leksiko

Kompilo kaj metodika prilaboro: Ryszard Rokicki

## TESTO 16

**Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

1. Kie ˽ ˽ n ˽ c ˽, tie malpaco.
2. Kio ˽ ˽ n ˽ ˽ n ˽ ˽ al sciuro, ne decas al vulturo.
3. Promeso estas larĝa, plenumo estas ŝ ˽ r ˽ ˽.
4. Vivi inter f ˽ r ˽ ˽ hejtita kaj tablo kovrita.
5. Se oni amas la gaston, oni zorgas la p ˽ s ˽ ˽ ˽.
6. La patrino prenis la plorantan knabineton sur siajn genuojn kaj komencis per ˽v˽ ˽ t ˽ voĉo rakonti ŝian amatan fabelon.
7. Jam de du tagoj la vento ˽ l ˽ ˽ i ˽ de l' maro kaj la rivero verdiĝis.
8. El Turkio kaj Arabio venis ekzotikaj varoj: tapiŝoj, ˽ p ˽ c ˽ ˽ kaj fruktoj.
9. La damnindaj meblistoj ial faras la ŝrankajn pordojn eksterordinare ˽ ˽ r ˽ ˽ kaj oni nepre frapas tiujn perkape.
10. La akton, subskribitan de la ĉeestantaj altranguloj, oni ŝlosis en ˽ k ˽ t ˽ ˽ ˽ kaj kaŝis sub la altaro.

**Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

1. Fakto estas, ke sen k ˽ ˽ ˽ t ˽ ˽ t ˽ fosado de ĵurnalistoj la diversaj skandaloj eble ne tiel rapide, detale kaj komplete evidentiĝus.
2. Por argentinanoj, kiuj loĝas en la vastaj e ˽ ˽ n ˽ ĵ ˽ ˽ de la bonaera provinco, la supreniro al nordaj provincoj estas okazo ekvidi belajn pejzaĝojn.
3. En la mezo de la placo en la arbaro staris domo, konstruita el la blankaj o˽ t ˽ ˽ de homoj pereintaj en la maro, kie loĝis la sorĉistino.
4. Mi ne kulpis pri nia disiĝo ... Jes, mi iniciatis ĝin, sed tio okazis ĉar mi estis t ˽ ˽ ˽ ˽ ˽ t ˽ de alia viro.
5. Kiam laŭ la biblia rakonto Eva al Adamo proponis la unuan p ˽ ˽ ˽ ˽, ŝi ne devis cerbumi: ĉu ne nocos la herbicidoj kaj insekticidoj.
6. La princo sentis pikadon en la okuloj, doloron en ĉiuj ostoj, li iom t ˽ s ˽ ˽. sed liaj pensoj estis klaraj kaj la koro plena de kuraĝo.
7. Johano Paŭlo la 2a p ˽ ˽ ĝ ˽ ˽ kaj petis pardonon de Dio pro la skismo de la eklezio de Kristo, pro uzado de nekristanaj metodoj dum disvastigado de la kristanismo.
8. Galileo Galilei estas la nomo kiun la Eŭropa Komisiono donis al ambicia projekto, kiun ĝi opinias necesa por **e** ˽ ˽ ˽ ˽ troan dependecon de Usono.
9. Superpotencoj kiaj Usono kaj Sovetunio ne sukcesis v˽ ˽ ˽ ˽ en Vjetnamio aŭ en Afganio.
10. Trapasante la facilajn rapidfluejojn de la rivero Enco, ni vidis plurfoje anasojn kun belaj oranĝaj b ˽ k ˽ ˽.

**Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| |
|---|
| ĝen', spez', aparten', arm', baston', anonc', ripar', te', preciz', sud' |

1. Anstataŭ ol respondi la du soldatoj en perfekta samtempo kunbatis siajn kalkanojn, svingis sian ˽ r ˽ ˽ l ˽ ˽ ĝis la ŝultro kaj salutis.
2. Japanaj geknaboj nun pli lertas, manipulante butonojn de televidaj ludoj ol ˽ ˽ s ˽ ˽ ˽ ˽ t ˽ ˽ ˽ por manĝi ostoplenan fiŝon.

3. Unu el la fontoj de la problemoj diveneble estis la kontraŭdiro inter anarĥiemo kaj impulsiĝemo de ␣ ␣ d ␣ l ␣ Corsetti kaj disciplinemo de nordulo Buller.
4. Imagu, vi ne rajtas trinki en publika ␣ e ␣ j ␣ el la sama glaso kiel altkastano kaj kompreneble vi ne rajtas sidi sur la sama benko kiel altkastano.
5. La Manifesto de Raŭmo invitis krei originalan valoran E-kulturon, sed ne ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ z ␣ g ␣ ␣, kiudirekte oni iru.
6. En propra intereso, entreprenoj kaj kapitalistoj devus kunagadi por ebligi al laŭeble multaj homoj ␣ n ␣ p ␣ ␣ ␣ monon per laboro.
7. Mi devis dufoje porti la komputilon al ␣ ␣ p ␣ ␣ ␣ j ␣ : la kosto de la riparado estis granda por homo, kiel mi, kiu ne plu ricevas monatan salajron.
8. Spamo ne estis mia sola ␣ ␣ n ␣ ĵ ␣, baldaŭ komenciĝis virusaj atakoj.
9. Du viroj portis la duone senkonscian virinon, ilia fratin prenis ŝian ␣ ␣ ␣ ␣ t ␣ ␣ ␣ ĵ ␣ ␣ kaj la bona akuŝistino portis la novan malgrandan mondanon.
10. Nikolaj finfine instaliĝas, helpe de amikoj, kiel ␣ ␣ ␣ n ␣ ␣ s ␣ ␣ kaj lingva redaktoro ĉe la Rusa sekcio de BBC.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

1. Mi pasante rimarkis, ke miaj kvar ___ daŭrigis sian petolan ludadon en la ĝardeno.
   a. boteloj b. valoj c. genevoj d. brosoj
2. La parazita, skarabo alvojaĝis al Eŭropa Unio en lignaj ___ kun ceramikaĵoj el Ĉinio.
   a. kestoj b. ĉemizo c. sekretoj d. spicoj
3. La princino sidis senĉese antaŭ la ___, observante atente la etajn makulojn sur sia frunto.
   a. ungo b. ŝnuro c. signo d. spegulo
4. Kristoforo Kolumbo, profunde indignigita, forveturis kun ___ decido forlasi por ĉiam tiun ĉi sendankan landon.
   a. firma b. fidela c. avara d. densa
5. En la 1860-aj jaroj Walras provis ___ postenon ĉe franca universitato, sed malsukcesis pro manko de formala edukado
   a. konfesi b. ripari c. akiri d. kombi
6. Ella parolis iom kolere: ŝiaj ___ ruĝiĝis kaj Mathilde vidis, ke la okuloj de la amikino malsekiĝis.
   a. skatoloj b. potoj c. plantoj d. vangoj
7. Emil similis al homo, kiu dum tagoj vagis en dezerto kaj nun, kiam trovis akvon en friska oazo, li ne povas ___ sian soifon.
   a. boli b. estingi c. anonci d. eduki
8. Ni ___ riverojn per digoj kaj tiel rabis al ili naturajn elfluejojn al vastaj kampoj kaj ebenoj.
   a. similis b. avertis c. armis d. bedaŭris
9. Mia patro fosis kaj purigis kanalojn, semis, ___ kaj, antaŭ ĉio, pagis la impostojn.
   a. rikoltis b. korespondis c. viŝis d. ĝenis
10. Trajan stariĝis, atente ___ la ikonon per sia ĉemizo kaj ekiris al la vilaĝo por rakonti al pastro Stojo pri la okazintaĵo.
   a. rifuzis b. volvis c. konsciis d. preĝis